
**Paiva Netto skribas** "Ne timu la krizon. Ĝi forpasos, vi restos"

# BONA VOLO

www.bonavolo.com

La Revuo de la Ekumena Spiritualeco • JARO 23 • N-ro 65

ELEVAÇÃO



**SPECIALE**

## Zamenhofa Jaro

- La 94-a Universala Kongreso de Esperanto omaĝas la 150-jaran naskiĝdatrevenon de la kreinto de la internacia lingvo en Bjalistoko, Pollando

- Legio de Bona Volo prezentas sian ekumenan mesaĝon en la evento

**Egaleco inter seksoj** UN okazigas la 53-an Kunvenon de la Komisiono pri la Situacio de Virino

# Kunlaborante kun LBV, Vi helpas konstrui pli bonan mondon!




**BANKO HSBC**
Bankokodo: 0343
Kontnumero:
63275-24

**BANKO SANTANDER**
Bankokodo: 0239
Kontnumero:
13002754-6

## Helpu vi LBV-on ampleksigi ĝian agadon!

LBV

**CENTRA SIDEJO**: Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo • Brasil • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.boavontade.com / **LBV DE ARGENTINO**: Av. Boedo, 1942 • Boedo • Buenos Aires CP C1239AAW • Tel.: (+5411) 4925-5000 • www.lbv.org.ar / **LBV DE BOLIVIO**: Calle Asunta Bozo, 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de Correo 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • www.lbv.org.bo / **LBV DE USONO**: 20 Calumet Street • Newark/NJ • Zip Code 07105 • Tel.: (+1973) 344-5338 • www.legionofgoodwill.org / **LBV DE PARAGVAJO**: Calle Curupayty, 1452 c/ Mayor Bullo Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/03 • www.lbv.org.py / **LBV DE PORTUGALIO**: Rua Alexandre Herculano, 355 • Freguesia da Sé • Porto • CP 4000-055 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt / **LBV DE URUGVAJO**: Av. Agraciada, 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790 • www.lbv.org.uy

ELEVAÇÃO

BONA VOLO

JARO 23• N-ro 65

BONA VOLO estas kvarmonata publikigaĵo de LBV, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, la 16-an/3/2006, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco Periotto MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Adriane Schirmer, Cida Linares, Felipe Duarte, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, José Roberto Tenório da Silva, Leila Marco, Letícia Rio, Maria Aparecida da Silva, Neuza Alves, Paulo César Pereira, Paulo Sérgio Viana, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Natália Lombardi, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

**GRAFIKA PROJEKTO KAJ KOVRILO:** Helen Winkler

**KOMPOSTADO:** Felipe Tonin

**PRESADO:** Mundial Artes Gráficas

**ĈIUJ RAJTOJ DE TIU ĈI ELDONO REZERVITAJ DE EDITORA ELEVAÇÃO:** Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3358-6919 • Fax: (+55 11) 3358-6882 • www.bonavolo.com

## Priprenso de BONA VOLO

"La monda stabileco komenciĝas en la koro de infano. Tial en LBV, de multaj jaroj, ni uzadas la Pedagogion de Amo."

Paiva Netto

# Traktato pri la Nova Ordono de Jesuo

Instruis la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatisto: *"Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. Jen estas mia Ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel Mi vin amas. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas. Kaj Mi tion ordonas: vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion Mi lernis de mia Patro, Mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu bonan frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion Mi ordonas al vi, ke vi amu unu la alian, kiel Mi amas vin. Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo".*

(Aranĝita de Paiva Netto, akorde kun la Evangelio de la Kristo de Dio, laŭ Johano, 13: 34 kaj 35; 15: 12 ĝis 17 kaj 9).

**4** Ne timu la krizon. Ĝi forpasos, vi restos
Paiva Netto

**7** Leteroj, retpoŝtoj kaj registroj
Esperantistoj parolas pri LBV


**8** Internacia
LBV kaj la esperantistoj kunplektas la manojn


**12** Speciale
Zamenhofa Jaro: Esperanto kiel paca ponto

**18** Unuiĝintaj Nacioj/Novjorko (Usono)
Tutmonda epidemio

**23** Soldatetoj de Dio
Preĝo de la Bona Infano












"Kio estas krizo, se ne oportuna okazo kun aspekto de malfeliĉo? Baroj estas premioj de Dio al nia inteligenteco, stimulo al tiu, kiu ne rezignas pri agado, kiu pravigas la vivon, kaj donas al ĝi koloron. Tiam oni plej bone povas utiligi sian talenton."

# Ne timu la krizon.
# Ĝi forpasos, vi restos.


João Preda


José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radiokomunikanto, verkisto, komponisto kaj poeto. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Eminenta lernanto de Kolegio Petro la Dua, li estas aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Internacia, Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI–Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

En Brazilo, ĉies atentoj turniĝas al la sekvoj de la nuna monda krizo. Favore aŭ malfavore, politikistoj, ekonomikistoj, entreprenistoj, analizistoj opiniadas pri rimedoj, kiuj bremsas aŭ stimulas konsumadon, aŭ ion ajn, kio evitu, laŭ ilia pensmaniero, sociajn perturbojn enlande.

Malgraŭ ĉia maltrankvilo, ni sciu utiligi ĉi tiun momenton por atingi ekvilibron, sen kio malfacile ni atingos sukceson. Kio estas krizo, se ne oportuna okazo kun aspekto de malfeliĉo? Baroj estas premioj de Dio al nia inteligenteco, stimulo al tiu, kiu ne rezignas pri agado, kiu pravigas la vivon, kaj donas al ĝi koloron. Tiam oni plej bone povas utiligi sian talenton. Ĉia malsukceso enhavas en si mem solvon, tiel instruas la antikva kaj saĝa orienta kulturo. Plendado nenion konstruas. Ni devas kontraŭbatali malentuziasmon, sen trompado al la homamaso. Homoj kaj nacioj, kiam ili fariĝas senesperaj, sendefende falas aŭ stariĝas ribele.

## Saĝeco de Konfuceo

Necesas revadi, helpi por ia pli digna mondo. *Pari passu,* oni havu la piedojn firme sur la grundo, tio estas, oni estu certaj, ke dezirataj ŝanĝoj ne alvenas sen efektiva penado. Ni meditu pri ĉi tiu perla saĝa penso de **Konfuceo**: *"Se ni sufiĉe antaŭe starigas*



Konfuceo

*nian konduton en la vivo, tiam nin neniam atakos afliktiĝo. Se ni antaŭe scias, kiuj estas niaj devoj, tiam ni facile plenumos ilin”.* Simpla planado.


Cetere, la filozofion de tiu respektata ĉina majstro oni konsideras kiel unu el la fundamentoj de la rimarkinda impulso, kiu aperigis “aziajn tigrojn”, kiuj nuntempe estas ankaŭ skuataj de la tutmonda streĉo. Okaze de renkontoj inter ekonomie gravaj landoj en la mondo – kompreneble pelataj de instinkta klopodo por pluvivado – serĉe de sanaj rimedoj por alfronti la krizon, estas tamen nepre necese, ke racio plektiĝu kun spirito de solidareco (io ankoraŭ malofta ĉe tiaj internaciaj rilatoj), ĉar la koro pli emas ĉiam aŭdi, kiam frateco estas efektive la fundamento de dialogo. Ili iam komprenos, ke sen amo, aŭ kiu ajn nomo en la “teknologia lingvo” oni uzos, oni nepre trovos tiujn grandajn suferojn antaŭdiritajn de **Jesuo** en Lia Evangelio, laŭ **Mateo**, en la tuta ĉapitro 24. Krome, la vivo estas ia konstanta sinpravigo ĉe tribunalo de la konscienco, de kiu neniu povas forkuri, eĉ se ĉio restas por ĉiam kaŝita.

## Energia sinteno

Nerenversebla sinteno estas oportuna respondo antaŭ ĉia krizo. (...) Ni ne forgesu, ke – kiam ni restadas ĉe Dio – tiam eĉ malfeliĉo montriĝas kiel favora okazo por kreado.

Ekzistas tiuj, kiuj pasigas jarojn atendante plej malbonajn okazojn. Nur tio sufiĉas por malsanigi homon.

Kial ne celi la plej bonan kaj klopodi labori por tio? **Thomas Jefferson** (1743-1826) memorigas nin pri ĉi tiu frapanta realaĵo: *“Kiom kostis al ni malbonaĵoj, kiuj neniam okazis!”*. Kaj krome ekzistas rusa proverbo, kiu konsilas: *“Kredu Dion, sed plu naĝadu al la marbordo”*.



Thomas Jefferson

Mia solidara penso al ĉiuj, popolanoj kaj registoj, kiuj alfrontas malfacilaĵojn, ne mallevas la standardon kaj honoras siajn familiojn kaj la patrujon, kaj tiel postvivas pli laboremaj kaj pli fortaj. Nia lando daŭre klopodas sin defendi de la tempesto, kiu nuntempe malkvietigas aliajn popolojn. Bona batalo liveras al ni valoran okazon por progreso.

Jesuo tamen ne krizas. Ni do petegu Lian protekton. ■

paivanetto@uol.com.br
www.bonavolo.com



"Nerenversebla sinteno estas oportuna respondo antaŭ ĉia krizo. (...) Ni ne forgesu, ke – kiam ni restadas ĉe Dio – tiam eĉ malfeliĉo montriĝas kiel favora okazo por kreado."

# Legu mesaĝojn pri Kulturo pri Paco per www.bonavolo.com



## Esperantistoj el la tuta mondo skribas al LBV

Karaj gefratoj de Legio de Bona Volo, mi aŭdas preskaŭ ĉiuj nokte la programon de LBV fare de José de Paiva Netto kaj mi tre ŝatas la programon. Mi ekkomencis lerni esperanton per unu revuo de LBV nomata "Soldatetoj de Dio".

Hodiaŭ mi estas delegito de Esperanto en Ribeirão Preto/San-Paŭlo.

Mi gratulas al vi por la instruado de la novaj Soldatetoj de Dio, kiuj faris kongreseton de infanoj. Mi aŭdis alian noktON, kiu instruis al ili Paiva Netto. Mi tre ĝojiĝis.
***(Manoel Moacir Sisccati, Brazilo)***

"Ne timu la krizon. Ĝi forpasos, vi restos" [de Paiva Netto]. Jen tre interesa frazo kaj leciono pri tiu krizo kiu timigas kaj malkuraĝigas ni ĉiujn. La interna ideo de LBV je la unua tempo de la ekscio kaptis mian atenton kaj animon.
***(Jean Bosco Malanda, Kongo)***

Mi kontinue legas la BONA VOLO ekde tiam, kiam mi estis en Brazilo. Mi propagandas tiun mesaĝon ne nur en Hungario, sed en la kadro de la fervojistaj esperantistoj en la tuta Eŭropo, eĉ en Ĉinio kaj Japanio. Kun karaj salutoj.
***(István Gulyás, Hungario)***

Mi nomiĝas HARADA Tsukuru kaj loĝas en la suda parto Kyushu, en urbo Kumamoto, kie estas bela kastelo kaj aktiva vulkano. Jes, estas japano (niponano). Mi elkore gratulas Paiva Netto pro lia naskiĝtago (la 2-an de Marto)! Kaj mi esperas, ke li estu sana kaj feliĉa! Kun forta brakumo kaj kapklino.
***(HARADA Tsukuru, Japanio)***

Mi esperas helpi LBV-on por ke tiu revuo atingos al multe da esperatistoj. Amike via.
***(Ali Mze Mihidjahi, Komoroj)***

Mi volonte tralegas pri E-aktiveco, E-staĝo kaj E-atingaĵoj de LBV. Esperante je porpaca kaj interkultura kunlaboro, mi petas en lastaj vortoj, ke vi salutu mianome vian grandan, saĝan kaj karisman intelektulon Paiva Netto.
***(Antonio Jerzy Walaszek, Pollando)***

Pro neebleco publikigi ĉiujn retpoŝtajn mesaĝojn kaj leterojn senditajn al la Ĉefgvidanto de LBV kaj al revuo BONA VOLO, ni dankas, per ĉi tiu eldono, kelkajn el ili kiel maniero reprezenti ĉiujn:

**Rubén T. Diaconu** (Argentino) – **Alcebíades Geraldo Lopes, Clayton Pereira, Fabiano Henrique, Jair Salles, José Roberto Tenório, Katarina Falcomer, Silvio Marcio Camargo Bruno** (Brazilo) – **SABIYUMVA Jérémie** (Burundo) – **Jarmila Rýznarová, Jiří Laube, Lucie Karešová** (Ĉeĥio) – **Augusto Casquero, Xiong Zhouxuan** (Ĉinio) – **August Kilk** (Estonio) – **Raita Pyhälä, Antti Mikkola** (Finnlando) – **Laurent Vignaud, Roger Degrelle** (Francio) – **Enrique Navarro** (Hispanio) – **Adrienne Pásztór, Árpád Máthé** (Hungario) – **Alessandro Simonini, Ermigi Rodari, Gianfranco Polerani, Lea Fabbri** (Italio) – **Boris-Antoine Legault** (Kanado) – **Emile Malanda, Roger Mambuene** (Kongo) – **Maritza Gutiérrez Glez** (Kubo) – **Hiroshi Nagata, Li Jianhua** (Japanio) – **Rita Valciukaite, Mara Timermane** (Litovio) – **Ĵoakino Rosillo** (Meksiko) – **Indu Thapalia** (Nepalo) – **Saeed Ahmad** (Pakistano) – **Carlos Miranda** (Peruo) – **Andrzej Grzebowski, Barbara Pietrzak, Roman Dobrzyński, Stanislao Rawiak** (Pollando) – **SIN Jongte** (Sud-Koreio) – **Claude Gacond** (Svislando) – **Saidnbaii Saidilhomzoda** (Taĝikio) – **Gbeglo Koffi** (Togo) – **Felipo Dorcas, Neil Blonstein** (Usono).

**Sendu ankaŭ Vi retpoŝton al LBV**

**esperanto@bonavolo.com**

# LBV kaj la esperantistoj kunplektas la manojn





## ARGENTINO

**Diskonigilo:** Revuo
**Nomo:** Argentina E-Vento
**Diskoniganto:** Rubén T. Diaconu

La oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo aperigas diversajn novaĵojn, esperante kaj hispane, pritraktante ĉefe agadojn celantajn la disvastigon de la internacia idiomo tutmonde.

En sia 35-a eldonnumero, la revuo elstarigis la agadon de Legio de Bona Volo, per kiu oni reliefigas la laboron de Planeda Civitaneco, kiun la Institucio realigas. La penso de la Direktoro-Prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, estis speciale reliefigita: *"Ekumenismo estas la plej alta esprimo de Amo, akso por ekvilibro de ia sana mondo".*



## JAPANIO

**Diskonigilo:** Informilo
**Nomo:** Esperanto-Societo en Numazu
**Diskoniganto:** HUZIMAKI Ken'iti

La esperanta-japana publikigaĵo aperigis en sia aprila eldono artikolon pri la laboro de plivastigo de la Ekumena Solidareco, kiun la Institucio plenumas jam de preskaŭ 60 jaroj. En la artikolo legeblas jenaj vortoj: *"Legio de Bona Volo* (LBV: www.bonavolo.com) *estas granda organizo kiu naskiĝis en Brazilo antaŭ 60 jaroj kaj ĉiam uzadis Esperanton. La laboron de LBV oni plenumas, per aŭtonomaj sidejoj, en sep landoj (Brazilo, Portugalio, Usono, Argentino, Bolivio, Paragvajo kaj Urugvajo). (...) LBV prizorgas ĉiutage milojn da infanoj kaj da maljunuloj en ĝiaj lernejoj kaj asistaj domoj".*

**Diskonigilo:** Interreto
**Nomo:** Blogo bona volo
**Diskoniganto:** HARADA Tsukuru

La japana esperantisto HARADA Tsukuru, Delegito de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj amiko de Legio de Bona Volo, kreis la blogon *bona volo*, en la japana (http://blog.livedoor.jp/bonavolo), per kiu li disponigas belajn fotojn kaj artikolojn pri la agadoj realigataj de LBV, pri la vizitoj, kiujn la Templo de Bona Volo, la Piramido de la Benataj Animoj, la Piramido de la Lumaj Spiritoj, akceptas ĉiutage, kaj pri la laboro de la fondinto de la plej vizitata monumento de la ĉefurbo de Brazilo, la verkisto kaj ĵurnalisto Paiva Netto.





## NORVEGIO

**Diskonigilo:** Revuo
**Nomo:** Norvega Esperantisto
**Diskoniganto:** Douglas Draper

La dumonata revuo de Norvega Esperanto-Ligo, kiu tradicias jam de 85 jaroj, publikigis en sia eldono 1/2009 artikolon titolitan *Esperanto aplikata*, per kiu oni registras: *“Ekde sia fondiĝo en 1950, LBV subtenas kaj uzas Esperanton. Religie ĝi baziĝas sur la instruo pri la Frata Amo de Jesuo; dum sur la socia kampo ĝi celas la Pacon kaj plibonigon de la mondo: ĝi konstruis plurajn lernejojn en Brazilo kaj alilande por eduki malriĉajn infanojn, instruante ankaŭ Esperanton. Miloj da infanoj ĉiutage ricevas apogon de LBV per sia edukado, kiu ankaŭ prizorgas maljunulojn kaj malsanulojn”.*

La oficiala organo de la Ligo reliefigas ankaŭ la partoprenon de la Institucio ĉe Unuiĝintaj Nacioj — kie ĝi havas statuson de ĝenerala konsulto en la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN (Ekosok) ekde 1999 — kaj ĝian ĉeeston en Latinameriko kaj Eŭropo.





## ĈEĤIO

**Diskonigilo:** Revuo
**Nomo:** Informilo
**Diskoniganto:** Jarmila Rýznarová

La ĉeĥa esperantistino, sekretariino de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kaj de Esperanto-Klubo Doktoro Schulhof, reliefigas en la monata publikigaĵo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio la gravecon de LBV en la vivo de ĉiuj, kiuj ĉiutage estas helpataj de la Institucio: *“Ĝi signifas fratecon, solidarecon, amon al la homaro, sendepende de la religia vidpunkto. Oni diras en Brazilo, ke 'LBV naskiĝis por ami kaj esti amata' de la popoloj. Ankaŭ por bone kompreni la agadon de LBV, grava estas la tralegado de la paĝaro de ĝia Direktoro-Prezidanto, la ĵurnalisto Paiva Netto:* www.paivanetto.com.br*”.*



## BELGIO

**Diskonigilo:** Revuo
**Nomo:** Esperanto en Marche
**Diskoniganto:** Marcel Delforge

La publikigaĵo *Esperanto en Marche*, esperante eldonita, reliefigas en sia maja eldono la agadon de la brazila Institucio.

La kunlaboranto de la publikigaĵo, Marcel Delforge, estas aktiva instruisto de Esperanto, kiu vivas en la urbo Charleroi, ĉirkaŭ 50 kilometroj for de Bruselo. Li tiel reliefigas: *“En Brazilo la organizo Legio de Bona Volo jam uzadas kaj apogas Esperanton de antaŭ 60 jaroj. Ĉe la multaj lernejoj de LBV oni instruas la internacian lingvon. LBV estas la plej granda organizo sia speca en Latin-Ameriko, kaj reprezentas la kontinenton ĉe la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok)”.*





## AŬSTRALIO

**Diskonigilo:** Informilo
**Nomo:** Tamen Plu
**Diskoniganto:** Robert Felby

La oficiala organo de Sudaŭstralia Esperanto-Asocio, *Tamen Plu*, en sia maja eldono, dediĉis artikolon al la laboro realigata de Legio de Bona Volo kaj ankaŭ al la Templo de Bona Volo, la Templo de Paco, substrekante, tuj sur la titolo de la artikolo, ke la monumento estis aklamita kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de la brazila ĉefurbo.

*"En la kampo de komunikado, la Organizaĵo dissendas pacan kaj fratecan mesaĝon pere de radia kaj televida retoj (...). LBV konstruadis ankaŭ en la urbo Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo, la Templon de Bona Volo, granda kaj bela, piramidforma konstruaĵo, kiu de antaŭ 20 jaroj estas la plej vizitata monumento de la ĉefurbo de la lando, laŭ oficialaj esploradoj de la Sekretariejo por Turisma Fako de la registaro en Braziljo. Al la Templo de Bona Volo monate iras miloj da homoj por preĝi kaj meditadi en tre paca kaj agrabla etoso. Ankaŭ tie oni parolas la lingvon de Espero, Esperanton!"*





## SERBIO

**Diskonigilo:** Interreto
**Nomo:** Ipernity
**Diskoniganto:** Dimitrije Janičić

La esperantistino Tereza Kapista, tradukisto, verkisto, preleganto, komitatano de Universala Esperanto-Asocio kaj Cseh-Metoda instruisto, intervjuiĝis en la blogo de la ĵurnalisto Dimitrije Janičić, en kiu ŝi reliefigis la laboron realigatan de Legio de Bona Volo pere de Esperanto.

En unu el la demandoj, s-ino Tereza raportas pri vizito, kiun ŝi faris al Brazilo: *"Mirinda lando. (...) Tie mi gvidis kursojn en multaj lokoj kaj la plej amasa estis tiu ĉe Legio de Bona Volo en São Paulo. Tiu estas respektinda organizaĵo. Tie oni laboras kiel entrepreno: ekzistas maljunulejo, infanĝardenoj, elementa kaj meza lernejoj, granda skipo de tradukistoj, organizantoj. Ankaŭ multaj homoj laboras bonvole, senpage kaj la rezulto estas videbla. Tiu movado disvastiĝas, bonfaras, havas respektindan organizan formon kaj uzas tiucele ankaŭ Esperanton. Unu el la celoj estas la edukado kiu ne estas tro en Brazilo".*

## PUBLIKIGAĴOJ DE LBV EN LA VIRTUALA MONDO

**Klaku –** Kreita en 2007, la retejo *klaku.net* celas prezenti liberuzan retejon, kun sociaj aspektoj, per kiu la esperantistoj publikigas la plej diversajn artikolojn kaj raportojn. Konektinte al la retejo, la retuzantoj povas eĉ taksi la gradon de graveco aŭ de intereso por ĉiu publikigaĵo, kaj aldoni komentojn. En la rubriko "Ĵusaj Novaĵoj" legeblas artikoloj de la *Reta Paĝaro Bona Volo*, per kiuj la retuzantoj havas la okazon iom konatiĝi kun la historio de LBV kaj kun la Solidara Idealo, kiun ĝi defendas ekde sia apero, cele restarigi la individuon, aliigante lin al transformanta aganto en la kolektivo por konstruo de pli bona mondo.

**La Esperanta Gazetejo –** La kanada esperantisto **Boris-Antoine Legault**, granda aktivisto en la movado de la internacia lingvo kaj estro de la TTT-ejo *La Esperanta Gazetejo* (www.gazetejo.org), eksciinte pri la socieduka agado de LBV, nepre volis, ke la publikigaĵoj de la Institucio aperu en sia retejo. Tie, esperantistoj el la tuta mondo gastigas oficialajn informilojn de Esperanto-Asocioj kaj revuojn, kiuj traktas pri temoj de la ĉiutago kaj eĉ pri tiuj kun politika kaj internacia trajtoj.

# Templo de Bona Volo

## estas aklamita de la Popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF - Brazilo





Aklamita de la Popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo, en la brazila Federacia Distrikto, la Templo de Bona Volo (TBV) ekde sia fondo en 21/10/1989, fare de Paiva Netto, jam akceptis pli ol 19 milionojn da pilgrimantoj kaj turistoj. Laŭ oficialaj datumoj de Sekretariejo pri Ekonomia kaj Turisma Disvolviĝo de la Federacia Distrikto (SDET), ĝi estas la monumento plej vizitata en la ĉefurbo de Brazilo. Apud ParlaMundi kaj sia administra sidejo, la Templo de Paco kompletigas la Ekumenan Ensemblon de Legio de Bona Volo.

**Vizitu ĝin! SGAS 915 – Lotes 75/76**

**Informoj: (+5561) 3245-1070 • www.tbv.com.br**

# ZAMENHOFA JARO
## ESPERANTO KIEL PACA PONTO


Jéssica Botelho kaj Felipe Duarte



La scenejo estis tiu de rasbataloj, pligravigitaj per lingva kaj etna miskomprenoj fare de loĝantoj de regiono en la antikva rusa imperio. La interkomunikado apenaŭ ebliĝis pro la etnioj parolis kvar apartaj idiomoj (la pola, rusa, germana kaj jida) kaj pro kulto al plej malsamaj moroj kaj kredoj.

La neceso forigi malamikiĝon inter la popoloj instigis la kuraciston kaj lingviston **Lazaro Ludoviko Zamenhof** (1859-1917), el Bjalistoko — nuntempe apartenanta al Pollando — krei lingvon rapide lerneblan kaj alireblan ne nur de kleruloj, sed ankaŭ de la popolo. Dotita per volforto por diskonigado de homama idealo,

Zamenhof elpensis la planlingvon plej multe parolatan en la mondo nuntempe, nome Esperanto.



Robert Felby

Iom post la lanĉo de la unua gramatika broŝuro de la nova lingvo, titolita *La Lingvo Internacia*, en 1887, la nombro de esperantistoj kreskis, same kiel la verkoj, kiuj ekbaptis la lingvon kiel Esperanto. El Eŭropo ĝi trairis Azion ĝis atingi Amerikon. Grava momento por tiu ekspansio registriĝis en Francio, en 1905, kiam okazis la 1-a Universala Kongreso de Esperanto kun la partopreno de preskaŭ mil personoj.




Jean Bosco Malanda

**Jean Bosco Malanda**, la fondinto de Asocio Solidareco kaj Agado, en Respubliko Kongo, atentigas pri la esperantistaj idealoj kiel sekvinda vojo por komprenado inter la popoloj: *"Entuziasmaj esperantistoj vekiĝis en Afriko ĉirkaŭ 1990. Bedaŭrinda, preskaŭ en ĉiu e-lando okazas konfliktoj kiuj ege bremsas la movadon en Afriko. (...) La granda defio estas, sen forgesi la nestabilan situacion, starigi vivantajn landajn asociojn".*

Ekde 1954, la idiomo estis rekonita de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko) kaj en 1985 la sama organizo rekomendis ĝian disvastigon inter siaj ŝtatoj-membroj.

El Aŭstralio, la redaktanto de *Tamen Plu*, **Robert Felby**, apogas la rekomendon, asertante, ke nepras kapabligi la individuojn por la unuiĝo cele kontentigi la bazajn necesojn de unuj aliaj: *"Ni devas zorgi, ke ĉiuj ricevu sufiĉe da manĝaĵo kaj vestaĵoj. Ke manku nenio al iu ajn. Ni, homoj, havas multajn devojn farendajn. Ni devas kapabli paroli pri la solvo de la problemoj de la mondo, kaj por tio ni bezonegas internacian lingvon, kaj mi proponas Esperanton, ĉar ĝi estas neŭtrala!".*

Evidentiĝas, ke lerni Esperanton, antaŭ ol lerni alian lingvon, rapidigas kaj plibonigas ies lernadon, fenomeno konata kiel propedeŭtika valoro. Pri tio, sin esprimas la Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio kaj membro de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA), **Renato Corsetti**, por kiu la lingvo ankaŭ estas *"ilo por meti homojn sur la saman nivelon je monda skalo. Per Esperanto ne plu estas grandaj kaj malgrandaj popoloj, kulturoj kaj lingvoj. Ni ĉiuj estas egalaj".*



Renato Corsetti

## 2009: 150-jariĝo de Zamenhof

Okaze de celebrado de la 150-jariĝo de la naskiĝo de la kreinto de la internacia lingvo, esperantistoj kaj simpatiantoj el ĉiuj naciecoj kunvenas pluan

## La Espero

*En la mondon venis nova sento,*
*Tra la mondo iras forta voko;*
*Per flugiloj de facila vento*
*Nun de loko flugu ĝi al loko.*

*Ne al glavo sangon soifanta*
*Ĝi la homan tiras familion:*
*Al la mond' eterne militanta*
*Ĝi promesas sanktan harmonion.*

*Sub la sankta signo de l' espero*
*Kolektiĝas pacaj batalantoj,*
*Kaj rapide kreskas la afero*
*Per laboro de la esperantoj.*

*Forte staras muroj de miljaroj*
*Inter la popoloj dividitaj;*
*Sed dissaltos la obstinaj baroj,*
*Per la sankta amo disbatitaj.*

*Sur neŭtrala lingva fundamento,*
*Komprenante unu la alian,*
*La popoloj faros en konsento*
*Unu grandan rondon familian.*

*Nia diligenta kolegaro*
*En laboro paca ne laciĝos,*
*Ĝis la bela sonĝo de l' homaro*
*Por eterna ben' efektiviĝos.*

***L.L. Zamenhof***

**LBV**

Legio de Bona Volo (LBV) estas neprofitcela civila asocio, laŭ privata juro, bonfara, filantropia, eduka, klereca, filozofia, ekumena kaj altruisma, rekonata en Brazilo kaj eksterlande pro sia socieduka laboro. Fondita de **Alziro Zarur** (1914-1979) en la 1-a de januaro 1950 (Monda Tago por Kunfratiĝo), nun ĝi estas gvidata de la Direktoro-Prezidanto **José de Paiva Netto**. La Institucio, kiu ĝuas internacian prestiĝon sur la kampo pri Edukado kun Ekumena Spiritualeco, kunlaboradas ekde sia apero por plibonigi la vivo-kvaliton de popoloj en situacio de damaĝebleco aŭ risko socia kaj/aŭ persona. Ĝia misio: Promocii Edukadon kaj Klerecon kun Spiritualeco por ke estu Nutrado, Sekureco, Sano kaj Laboro por ĉiuj, en la formado de la Ekumena Civitano. Ekde 1994, LBV tenas partnerajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj (UN), pere de la Departemento pri Publika Informado (DPI). En 1999, ĝi fariĝis la unua brazila civila organizo, kiu akiris ĉe UN la statuson de ĝenerala konsulto en la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok) kaj, en 2000, aniĝis al la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsultaj Rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj (Congo) en Vieno, Aŭstrio. Krome, LBV reprezentiĝas en la novjorka sidejo de UN, kiel Vicprezidanto de la Komitato de NRO-j pri Spiritualeco, Valoroj kaj Tutmondaj Interesoj, grupo ligita al Congo. La laboron de LBV oni plenumas, per aŭtonomaj sidejoj, en sep landoj (Argentino, Bolivio, Brazilo, Paragvajo, Portugalio, Urugvajo kaj Usono).


fojon por diskuti la progresojn, celojn kaj defiojn alfrontatajn de organizaĵoj, asocioj kaj movadoj, kiuj disvastigas Esperanton. Ĉi-jare, en la 94-a eldono de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en la pola urbo Bjalistoko, la partoprenantoj estas invititaj pensi pri kiel estigi ponton de paco inter la popoloj.

Per tre varia programo, novaj planoj estos skizitaj por impulsi la progreson de la idiomo, kiu, laŭ paso de la tempo, akiras pli influajn rezultojn en la vivo de tiuj, kiuj batalas por la falo de ĉiaj lingvaj baroj. La pola ĵurnalisto kaj kinfilmisto **Roman Dobrzyński**, ankaŭ eksa Vic-prezidanto de UEA, konsideras la idiomon kiel rimedon por konekti la mondon. *"Kvankam mi parolas kelkajn lingvojn, tamen tre ofte uzis Esperanton, kiel la lingvon de mia profesia aktiveco. Mi faris plurajn dokumentajn filmojn aplikante Esperanton, kiel laborlingvon"*, li komentas.

# LBV kaj Esperanto

Ne estas duboj pri tio, ke Esperanto plu varbas sennombrajn laborantojn, kiuj faras sian plejbonon por disvastigi la lingvon internacian. Tio okazas, ĉar ĝi prezentas du aspektojn je granda intereso por siaj lernemuloj, nome tiun lingvan kaj tiun idealan, kiuj multe identiĝas kun Legio de Bona Volo — tiuj de Paco kaj kunfratiĝo de la mondaj nacioj. La karmemora fondinto de LBV, Alziro Zarur, evidentigis la utiligo-povon de la zamenhofa idiomo, adoptante ĝin en la agado de la Institucio. Pro tio, LBV, ekde sia apero, prestiĝigas Esperanton per ĉiaj disponeblaj rimedoj, tiel plenumante unu el la gvidlinioj de la Institucio, nome *"Batali por la plej granda disvastigado de la internacia lingvo Esperanto, altvalora ilo por la interfratiĝo de la popoloj, laŭ la konsidero, ke LBV estas la Esperanto de la religioj, same kiel Esperanto estas la LBV de la lingvoj".*

Kreita en la unuaj tempoj de LBV, la Departemento pri Esperanto havas kiel celon diskonigi ĝian Senlime Ekumenan mesaĝon tra la tuta terglobo, per uzado de la lingvo internacia kiel pova unuigilo. Tiu vasta koncepto pri Ekumenismo, kiu




Publikigita en 1988, *Meditadoj kaj Pensoj — Dialektiko de Bona Volo*, de aŭtoreco de la verkisto Paiva Netto, estis la unua libro de LBV presita en la lingvo internacia. La eldona lanĉo distingiĝis per la artikolo "Brazila Ekumena Organizo uzas Esperanton", verkita de instruisto **Jorge das Neves** kaj aperinta en la revuo *Esperanto*, oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, en la 1980-aj jaroj.

> “LBV estas la Esperanto de la religioj, same kiel Esperanto estas la LBV de la lingvoj”
>
> **Dialektiko de Bona Volo**

sin antaŭmetas kontraŭ la diskonigata “interpuŝiĝo de kulturoj” — kiu povas altiri la popolojn al kolosa milito, eble plej damaĝa ol tiu imagebla ĝis antaŭ nelonge —, estas de la ĵurnalisto José de Paiva Netto, Direktoro-Prezidanto de LBV.

Grava apoganto de la disvastigado de Esperanto, Paiva Netto ĝin uzas kiel ilon por diskonigi tiun Ekumenismon, kiu, laŭ li, estas komprenata kiel Universalismo, Frateco sen limoj. *“Ni aludas al Ekumenismo de la Koroj, nome tiu, kiu konvinkas nin ne malŝpari tempon pro malamoj kaj senfruktaj kvereloj, sed etendi la manon al falintoj, ĉar ĝi emociiĝas antaŭ doloro; deprenas sian ĉemizon por vesti nudulon; kontribuas por havigi la kuracan balzamon al malsanulo, protektas orfojn kaj vidvinojn; konscias, ke Edukado kun Ekumena Spiritualeco estas esenca por elvolviĝo de la popolo, ĉar Ekumenismo estas Edukado malferma al Paco”*, klarigis li per la revuo *Solidara Socio* (7-a eldono), portita de reprezentantoj de LBV al UN, ekde la jaro 2000, ankaŭ en Esperanto.




Mesaĝoj pri Ekumena Spiritualeco por konstrui ian Solidaran Socion. Ĉi tiuj estas la eldonaĵoj, je granda internacia eĥo, liveritaj al aŭtoritatuloj, delegitaroj el pluraj landoj, reprezentantoj de neregistaraj organizoj kaj ŝtatestroj okaze de eventoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

La italo Corsetti esprimas sian admiron al ĉi tiu idealo: *“LBV estas, kiel Esperanto, konkreta laboro por plibonigi la mondon. Dum Esperanto faras tion je kultura kaj iom teoria nivelo, LBV faras tion praktike kaj konkrete per helpo al homoj ĉi tie kaj ĉi tiam. Sukcesojn al LBV!”*.

Same kiel la supre menciita revuo *Solidara Socio,* laŭ iniciato de la Ĉefgvidanto de LBV, pliaj aliaj publikigaĵoj kun la mesaĝo de la Institucio estis tradukitaj al Esperanto, ekzemple ekumenaj preĝoj, literaturaj paĝoj, bibliaj tekstoj, revuoj, faldfolioj, ĵurnaloj, informfolioj, infanaj libroj i.a.. Elstariĝas ankaŭ la kreo de la Reta Paĝaro Bona Volo, ofte

> “Mi kun plezuro legas kaj tradukas la tekstojn de Legio de Bona Volo. Tio estas por mi honora laboro. Ĝia idearo mirinde kunligas idealismon al praktiko. LBV trovis vojon tre oportunan, pri kies taŭgeco neniu bonintenca homo dubus: Solidareco super kredodetaloj; Homamo super harfendaj fidodiskutoj; Edukado kun morala stimulado; Socia Apogado kun digno kaj respekto.”
>
> **Paulo Sérgio Viana**
> Vic-prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL)






Fotoj: Arkivo BV

**(1)** Parta vidaĵo de la solena malfermo de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, en Japanio, en 2007. **(2 kaj 3)** La Soldatetoj de Dio, kiel oni karese nomas la infanojn ĉe LBV, kaj la agemaj gejunuloj de Bona Volo ĉeestas lecionojn de Esperanto, unu el la aktivadoj kadre de Lecionoj pri Ekumena Moralo (AME en la portugala), en pluraj subsidejoj de la Institucio disaj tra Brazilo. **(4)** Budo de LBV en la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto, en la ĉefurbo de Rio-de-Ĵanejro, en 2007. **(5)** La budo de LBV ankaŭ estis tre vizitata de argentinaj infanoj kaj gejunuloj, en 1988, okaze de la 47-a Argentina Kongreso de Esperanto.

## POLLANDO — LA HEJMLANDO DE IA IDEALISTO




**Oficiala nomo:** *Rzeczpospolita Polska* [Pola Respubliko]

**Ĉefurbo:** Varsovio, rekonstruita post la Dua Monda Milito. Membriĝo en la Eŭropa Unio okazis la 1-an de majo 2004.

**Nacia Tago:** la 3-an de majo

**Devizo:** *Honor i Ojczyzna* [Honoro kaj Patrujo]

**Situo:** en la norda centro de Eŭropo, ĉe la bordoj de Balta Maro

**Areo:** 312.685 km$^2$

**Landeroj:** 49 provincoj

**Klimato**: modere kontinenta, kun ekstreme severaj vintroj

**Ĉefaj urboj:** Varsovio, Lodzo, Krakovo

**Loĝantaro:** ĉirkaŭ 38.8 milionoj

**Oficiala lingvo**: la pola, sed ankaŭ la germana estas parolata.

**Monunuo:** zloto (Zł) kiu pole signifas "orumita".

**Landlimoj:** Germanio, Ĉeĥio, Slovakio, Ukrainio, Belorusio, Litovio kaj Rusio

**Mondaj Heredaĵoj:** Forsto Bialowieza, Salmino de Wieliczka, Historiaj Centroj de Varsovio kaj de Krakovo, kaj ankaŭ la antikva urbo Zamosko.



Reprodukto BVTV

Bildo de la intervjuo donita de la Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo al la tiama Vic-prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, la ĵurnalisto **Roman Dobrzyński**, el la Pola TV, kiu ĉeestis en Brazilo por partopreni en la inaŭguro de la Templo de Bona Volo, en 1989, monumento aklamita de la Popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de la brazila ĉefurbo.



Arkivo BV

Okaze de la Granda Asembleo de LBV en Rio-de-Ĵanejro, la 22-an/2/2007, la ĵurnalisto **Paiva Netto** ricevas omaĝon de Oomoto (kimonon kun la blazonoj de Oomoto, el Japanio, kaj de antikva japana guberniestro de la familio Ŝimazu, suvereno en sia lando de antaŭ 500 jaroj). Sur la foto aperas s-ino **Lucimara Augusta** (maldekstre), Prof-o. **Ŝigeki Maeda** kaj **Jorge das Neves**, esperantisto kaj Legiano de Bona Volo.

aktualigita per mesaĝoj pri Ekumena Spiritualeco. *"Reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, kaj por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka kompreniĝado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed afero tute natura"*, proklamis Zamenhof akorde kun la Legianaj idealoj. ■

La revuo BOA VONTADE [BONA VOLO] publikigita en 1950-aj jaroj aperigadis la kurson fare de E-Departemento de LBV




## Esperantaj simboloj




**Verda stelo**

Tradicie la kvin pintoj reprezentas Amerikon, Eŭropon, Afrikon, Azion kaj Oceanion. La verdo simbolas esperon. La plifirmiĝo de la stelo kiel simbolo de Esperanto datiĝas de la lastaj jaroj de la 19-a jarcento.

**Flago**

La flago estas plivastigo de la verda stelo, prenante la saman koloron kaj signifon kaj aldonante la blankon por reprezenti pacon kaj neŭtralecon. Komence ĝi estis la flago de la esperanta klubo de Bulonjo-ĉe-Maro (Francio). Oni disvastigcele adoptis ĝin en tiu urbo profite de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto, en 1905.


**Jubilea simbolo**



La jubilea simbolo reprezentas la idealon de la lingvo: kunfratiĝo de ĉiuj. La du flankaj duonoj reprezentas la latinan literon E (**E**speranto) kaj la cirilan Э (**Э**сперанто), simbolante la unuiĝon de Okcidento kaj Oriento.

**Unuiĝintaj Nacioj/Novjorko (Usono)**

LBV partoprenas en evento por egaleco inter seksoj



# Tutmonda epidemio

Okaze de la 53-a Kunveno pri la Situacio de Virino, UN taksas la evoluon de HIV/aidoso kaj proponas samrespondecajn agadojn inter la seksoj cele al zorgoj pri la malsano.

Natália Lombardi

Fotoj: Adriana Rocha kaj Danilo Parmegiani


La rapido per kiu la viruso HIV plivastiĝas en malriĉaj regionoj kaj la fakto pri tio, ke la epidemio ne montras signojn de retroiro en aliaj landoj, maltrankviligas aŭtoritatulojn kaj popolojn. Laŭ la Ministrejo pri Sano, de 1980 ĝis ĉirkaŭ la mezo de 2007, estis registritaj en Brazilo 474.273 kazoj de tiu akirita imun-deficita sindromo. Ankoraŭ laŭ la Ministrejo, laŭ paso de la tempo, la proporcio inter la seksoj grade malpliiĝas. En 1985, registriĝis 15 kazoj ĉe viroj kontraŭ unu ĉe la virina grupo. Freŝdataj donitaĵoj montras, ke la rilato malkreskis, nun la diferenco estas 1,5 kontraŭ 1 inter la seksoj.

La ĉi-jaran marton, okaze de la 53-a Kunveno de la Komisiono pri la Situacio de Virino (angle, CSW) ĉirkaŭ du mil internaciaj reprezentantoj de la civila socio — inter kiuj tiuj de Legio de Bona Volo, kiu akiris statuson de ĝenerala konsulto en Ekosok (Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN) ekde 1999 — kaj delegitaroj de la ŝtatoj-membroj de Unuiĝintaj Nacioj kunvenis en la novjorka sidejo de la organizo, en Usono, por pridiskuti la egalecan disdividon de respondecoj inter la seksoj kaj la zorgojn rilate al HIV/aidoso. La evento reasertis la Programon de Agado kaj Deklaro de Beijing (Ĉinio) kaj ratifikis la neceson forigi iujn ajn formojn de diskriminacio kontraŭ la Virino.

## Batalo por la vivo

La adopto de rimedoj por helpi malpliigi la nombron da individuoj infektitaj de HIV-viruso, speciale ĉe virinoj, ĉefrolis en la debatoj de tiu 53-a eldono de CSW. Tiu celo devas










## MESAĜO DE LBV DISTINGIĜAS EN UNUIĜINTAJ NACIOJ

**(1)** S-ro **Michel Sidibé**, Plenuma Direktoro de UNAIDS kaj Ĝenerala Subsekretario de Unuiĝintaj Nacioj, ricevas el la manoj de Mariana Malaman, el LBV, la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo*. **(2)** Ambasadoro **Hilario Davide Jr.** (dekstre), Estro de la Filipina Misio en UN apud Danilo Parmegiani, el LBV. **(3)** Brazila delegitaro: **César Bonamigo**, membro de la Brazila Misio en UN; **Janete Mazzieiro**, Plenumsekretariino de la Forumo pri Virinoj en la Merkato Komuna de la Sudo (Mercosul); d-ino **Lourdes M. Bandeira**, porparolanto de la Brazila Delegitaro en la evento kaj Subsekretariino pri Planado de la Speciala Sekretariato de Strategioj por la Virinoj (reprezentanto de la Ministrino **Nilcéia Freire**); d-ino **Cecília Bacellar Sardenberg**, antropologino ĉe la Centro de Interfakaj Studoj pri la Virino — NEIM, en la Federacia Universitato de Bahia, Brazilo, kune kun Adriana Rocha, el LBV. Vizitantoj de la Templo de Bona Volo, Janete kaj s-ino Lourdes reliefigis, ke la monumento helpas al la demandoj pri Paco kaj familia harmonio. La brazila prezentado rilatis al la Leĝo Maria da Penha kaj la partoprenantoj ĝojis legi artikolon pri ĝi verkita de la Direktoro-Prezidanto de LBV. **(4)** Conceição de Albuquerque kaj la Prezidanto de la 53-a CSW 2009, **Olivier Belle**, el la belga delegitaro.

plivastiĝi trans la afrikan kontinenton, kie la situacio de la malsano pli gravas, atingante ankaŭ riĉajn landojn, kiel Usono, kaj efektiviĝas kiel tutmonda respondo al la problemo.

Cetere, LBV de Usono subtenas laboron celantan la preventon kaj vastan konsciigon pri aidoso, partnere kun la Universitata Hospitalo de Nov-Ĵerzejo. La Prezidantino de organizaĵo, kiu helpas seropozitivulojn en Afriko, la senegalanino **Adja Mame Diarra Seck Wade**, kredas je la vivo: *"Mi estas persono kun HIV, kiu havas esperon. Ekde mia malsano-infektiĝo la aferoj fariĝis tre malfacilaj, sed mi provas vivi optimisme cele helpi tiujn, kiuj same malsanas kiel mi"*.

## Justa omaĝo

La partoprenantoj en la UN-evento ricevis, el la manoj de reprezentantoj de Legio de Bona Volo, la specialan publikigaĵon *BOA VONTADE Mulher* [BONA VOLO Virino] (eldonitan angle, portugale kaj hispane), per kiu oni faras justan omaĝon al la virina animo kaj ties kapablo superi kaj kontribui al solvo de gravaj problemoj kiuj afliktas la popolojn. *"Mi deziras al vi kuraĝon, ĉar vi havas gravan mision, nome la transdono ne nur de informoj, sed la edukado de la homa raso"*, eldiris la reprezentantino de la Konsilio de la Religioj kontraŭ HIV/aidoso en Maŭricio, **Homa Mungapen**.

Ankaŭ la psikologino **Martha Gallahue**, reprezentanto de *National Service Conference of the American*











La porparolanto de la delegitaro de Senegalo en la 53-a Kunveno de la Komisiono pri la Situacio de Virino, s-ino **Awa Dieng**, kaj la karmemora konsultisto de UN **Joseph Owondo**, el Gabono, kun la revuo *BONA VOLO Virino*. Maldekstre, Rosana Bertolin, el LBV.



S-ino **Ana Milagros Martínez** (la dua de maldekstre), el la Kuba Delegitaro, kune kun la reprezentantoj de LBV Mariana (maldestre) kaj Conceição de Albuquerque.




S-ino **Michele Fedoroff** (maldekstre), Adjunkta Eksestrino de la Sekcio de NRO-j ĉe Ekosok, apud Adriana Rocha, el LBV.

## Amiko de idealo

BONA VOLO kaptas la okazon por omaĝi la pliaĝan konsultiston ĉe Unuiĝintaj Nacioj, **Joseph Owondo**, el Gabono (Afriko). Li estis en la flugo 447, de Air France, kiu ekiris de Rio-de-Ĵanejro/RJ la 31an de majo 2009 survoje al Parizo, kaj falis en la Atlantikan Oceanon.

Owondo ĉiam montris simpation pri la laboro de Legio de Bona Volo. Tial, la distingo fare de la Direktoro-Prezidanto de la Institucio, Paiva Netto, en sia artikolo "Fido kaj doloro", per kiu li rememorigis tiun amikecon: *"Ekde la akcidento de la flugo 447, ni tie ĉi en LBV preĝadas por tiuj, kiuj estis prenitaj de la destino, kaj kondolencas iliajn karajn familianojn. Ankaŭ valora amiko je idealo, la gabona konsultisto ĉe Unuiĝintaj Nacioj, Joseph Owondo, kiu estis volontula kunhelpanto de nia laboro en UN, estis en tiu flugo. Por tiuj, kiuj forlasis nin tiel subite, mi petas al Dio protekton kaj spiritan konsolon por iliaj animoj. Kie ajn ili estu, ĉar la mortintoj ne mortas, akceptu niajn pensojn de amo kaj sereneco".*




S-ino **Arleen Elias** (maldekstre), el *Care and Hope Women's Center* (usona NRO, kiu havigas helpon por ke virinoj ne abortigu), kaj Adriana Rocha, el LBV.




S-ino **Homa Mungapen**, membro de la Maŭricia Delegitaro kaj Kunordiganto de projektoj de la Konsilio de la Religioj kontraŭ aidoso.

*Ethical Union* ĉe UN, substrekis: *"Tiu revuo estas belega. Mi estas impresita pro la diverseco de ĝia enhavo. Per ĝi oni honoras ne nur la tradicion de* ***Eleanor Roosevelt****, sed tiun de aliaj admirindaj virinoj kiel* ***Asha-Rose Migiro*** *kaj* ***Wangari Maathai****, kaj temas do pri mirinda priskribo de malnovaj kaj novaj bataloj, kun implicoj al la estonteco".* Kaj kompletigis Martha: *"Konstateblas nekredebla evoluo rilate al la aliiĝo de povo de regado al tiu de kunlaboro. Kaj kompreneble la revuo montras, ke tiuj gravaj virinoj estis povaj, sed ankaŭ ekstreme kunlaboraj".*


Kiel laŭdas la verkisto Paiva Netto, per artikolo de sia aŭtoreco publikigita en la revuo *BONA VOLO Virino*, titolita "Jarmilo de la Virinoj": *"La Virino, tiu flanko plej ĉarma de la Homaro, distingiĝas kiel la bazon de ĉiaj*

Rosana Bertolin, el LBV, interparolas kun s-ino **April Hymen** (meze), Direktorino de *Client Services of Pregnancy Center,* kaj s-ino **Millie Lace** (dekstre).



S-ino **Fatou Mbye**, Prezidantino de la Nacia Konsilio de la Virino en Gambio, kune kun Mariana Malaman.







Meze, **Aparna Mehrotra**, Direktorino de la Departemento pri Fokusaj Debatoj por la Virino ĉe UN, kune kun Danilo Parmegiani kaj Adriana Rocha, el LBV.




S-ino **Mazal Renford** apud s-ino **Asha-Rose Migiro**, Ĝenerala Vic-sekretariino de UN, unu en la omaĝitoj, kies biografio estis publikigita en la revuo *BONA VOLO Virino*.




Danilo Parmegiani, el LBV, donacas la revuon *BONA VOLO Virino* al la ano de la Plenuma Komitato de la Konferenco DPI/NGO, **Richard Jordan** (maldekstre).



La psikologino **Martha Gallahue**, reprezentanto ĉe UN de NRO *National Service Conference of the American Ethical Union*, apud Danilo Parmegiani, el LBV.

## Reedukado

La usonano **Richard Jordan**, membro de la Plenuma Komitato de la Departemento pri Publika Informado (DPI/NGO), montris sin entuziasma pri la proponoj de la Ĉefgvidanto de LBV por progresigo de frateca socio komencanta de urĝa reedukado fare de la popoloj. *"Nepras, ke ni revenu al la vortoj de José de Paiva Netto kaj lia Pedagogio de Amo. Mi vizitis Brazilon kaj vidis kion LBV faras; mi ja scias do kia estas la laboro, mi travivis ĉion ĉi. Estis mirinde. Mi ĝojas esti intervjuata kaj kundividi miajn rememorojn pri mia vizito al Rio de Janeiro kaj al Belo Horizonte. Koran dankon. Vi faras bonegan laboron. Dio benu ĉiujn!"*, komentis Jordan.

La israelanino **Mazal Renford**, direktorino de *Golda Meir Mount Carmel International Training Center* kaj ankaŭ ĉeestanta la eventon, rigardas Edukadon kiel esencan demandon, kaj reliefigas: *"Nepras, ke ni kunligu ĉiujn programojn kaj kunigu la personojn je ĉiuj niveloj cele superi la obstaklojn kaj vere praktiki la rekomendojn proponitajn en la Konferenco de Beijing. El dekdu krizaj kampoj, ok estas rekte konsiderataj de la civila socio en Izraelio"*. La organizaĵo, kiun ŝi gvidas, agadas cele al povigo de la virino, ofertante profesian formadon kaj trejnadon pri diversaj fakoj.

*grandaj faroj. Tio, kio fizike nin konsistigas estas formita en ŝia ventro (...). Tie ĉi mi celas reliefigi kiom esenca estas la misio de la Virino por la homa* ***evoluo*** *kaj por la planeda* ***sekureco*** *(...). Niaj unuaj paŝoj cele al disvolviĝo de civitaneco estas gvidataj de ŝi, nin kondukante per la manoj.* ***La monda stabileco komenciĝas en la koro de infano****. Tial en LBV, de multaj jaroj, ni uzadas la Pedagogion de Amo. (...) Kiel mi skribis en la ĵurnalo* Folha de S.Paulo *en 1987, la Virino, se integriĝinta al Dio, estas la bazo de la civilizacio".*

La fakto ke la virina animo estas reprezentata en la publikigaĵo per eksterordinaraj biografioj tio pravigis la distingaĵon. Ekzemple la komento farata de **Norah Winyi**,

**(1)** S-ino **Chantal Kambiwa**, Vicprezidantino de *Socialist International*, kun sia filino, Nelly.
**(2)** S-ino **Mballa Cecile**, Unua Sekretariino de la Kamerunia Misio en Unuiĝintaj Nacioj, apud Conceição de Albuquerque (maldekstre), el LBV.





Delegitaro de Sudafriko. Maldekstre: d-ino **Manto Tshabalata-Msimang**, Prezidanteja Ministro de Sudafriko.





Rosana Bertolin donacas la revuon *BONA VOLO Virino* al reprezentantoj de la sudana registaro, kiu interesiĝis pri la laboro de LBV kaj nepre volis interŝanĝi vizitkartojn cele plu informiĝi pri la aktivadoj de la Institucio.




La porparolanto de Vatikano ĉe Unuiĝintaj Nacioj, s-ino **Annalisa Sacca**, elvortigis sian ĝojon, vidante en la revuo la omaĝon faritan de la Direktoro-Prezidanto de LBV al **Patrino Tereza de Kalkuto**.



S-ino **Shazia Marri** (maldekstre), pakistana Ministrino, apud la juna legianino Mariana Malaman. En la okazo, la reprezentantino de Pakistano ricevas la publikigaĵojn de LBV.




Arkivo BV

Legio de Bona Volo okazigas plurajn kampanjojn por Valorigo de Vivo. Unu tia ekzemplo estis la marŝado realigata de la Institucio sub la slogano kreita de Paiva Netto: *"Aidoso — la viruso de antaŭjuĝo pli minacas ol la malsano"*. La agado mobilizis 200 mil personojn en la ĉefurbo Rio-de-Ĵanejro, en Brazilo, la 1-an de decembro 1996.

el Kenjo, kiam ŝi konatiĝis kun la historio pri vivo kaj batalo de sia samlandanino Wangari Maathai, raportita en tiu ĉi eldono de la revuo: *"Mi estimas tion, ke vi rekonis kaj valorigis malsamajn virinojn en la mondo, kiuj kontribuis al fundamentaj transformiĝoj. Vi rekonis kenjanion, tiun personon, kiu komencis per malgrandaj agoj, sed grandaj je signifo, kaj kapablis altiri homojn por enkonduki tion, kion sola ŝi ne sukcesus fari"*.

Sur la lastaj paĝoj de *BONA VOLO Virino*, la leganto trovas seriozan penson pri perforto hejma kaj familia kontraŭ la Virino. Malakcepto de tia konduto estis reasertita de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj okaze de parolado en la plena kunsido. Laŭ **Ban Ki-moon**, la ago karakteriziĝas kiel *"krimo kontraŭ la Homaro. (...) Temas do pri atako kontraŭ ni ĉiuj, en la fundamento de la civilizacio"*.

En ĉiuj tagoj de la evento, LBV prezentis al la partoprenantoj raporton kaj ekzemplojn pri la diversaj sociedukaj agadoj realigataj favore al virinoj. Tiun sperton oni povis vidi en la budo de LBV per prezentado de la programoj kaj projektoj realigataj favore al egaleco por rajtoj kaj devoj inter la seksoj.

*"De longa tempo ni rilatiĝas kun Legio de Bona Volo, kaj dum tiu periodo mi atentas pri ĝia laboro favore al la Virino. Mirindas ĉe LBV tio, ke ĝi venigas Amon al ĉio, ĉiam. Mi konstatis, ke tio estas skribita en la bela revuo lanĉita de Paiva Netto. Tio estas la plej grava elemento rilate al la temo pri egaleco inter la seksoj"*, diris la usonanino **Sharon Hamilton-Getz**, Prezidantino kaj fondinto de Projekto Harmonio kaj Monda Paco.



Sharon Hamilton-Getz

**(1)** S-ino **Dunstanette Macauley**, Direktorino de Zonta (delegitaro de Liberio), kaj s-ino **Norah Winyi**, Plenuma Direktorino de *African Women's Development and Communication Network* (delegitaro de Kenjo), kaj Adriana Rocha, el LBV. **(2)** S-ino **Elza Pais**, el la prezidantejo de la Konsilio de Portugaliaj Ministroj kaj Prezidantino de la Komisiono por la Civitaneco kaj Egaleco inter la Seksoj, kune kun Sâmara Malaman (maldekstre) kaj Danilo Parmegiani, el LBV.

1



2



# Preĝo de la Bona Infano

**Leopoldo Machado**
**Legiano de Bona Volo n-ro 2**
**(El la portugallingva originalo esperantigis Tenorjo)**

— Sinjoro, Vi ĉion donas al mi:
Vivon, sanon, forton kaj inteli-
genton!
Mi tamen ankoraŭ nenion
Al Vi donas, Sinjoro,
Sed mi havas esperon
Doni multon al Vi,
Dum mi estas infano!

Mi promesas doni al Vi
La volon esti obeema
Al miaj gepatroj, al miaj geins-
truistoj, hejme,
kaj bonagi favore al ĉiu persono.
Ankaŭ la volon, Sinjoro,
Agadi per la praktiko de Bono
Neniam farante ion
por vundi, molesti aŭ suferigi
nek la etulojn, nek la bestojn:
Mi volas esti bona infano.

*Prenita el la libro *Al la Koro de Dio — Ekumena Kolekto da Preĝoj* — de aŭtoreco de la verkisto Paiva Netto, Eldonejo Elevação.





Rio Tókio, Narita e Honda.
Aqui sobra boa vontade para você sair com os mais desejados do Brasil.
GARANTIA 3 ANOS
NEW CIVIC
O CARRO MAIS DESEJADO DO BRASIL ESTÁ NA RIO TÓKIO E NARITA.
GARANTIA 3 ANOS
CR-V
NOVA CR-V 2009 NAS VERSÕES 4X2 E 4X4
O carro certo para quem procura mais conforto e estilo.
GARANTIA 3 ANOS
Accord
ACCORD EX 3.5 V6 24V 278CV
Elegância e tecnologia para quem quer voar mais alto.
New FIT
Estilo, esportividade e versatilidade.
GARANTIA 3 ANOS
PROGRAMA Honda Conduz
Atendimento especializado para pessoas portadoras de necessidades especiais, com superavaliação do seu veículo na compra de um Honda 0km e isenção de impostos (IPI, ICMS e IPVA).
Consórcio Nacional Honda
PARCELAS A PARTIR DE: 749,14*
TOTALMENTE SEM JUROS - ENTREGA GARANTIDA PELA FÁBRICA - MENOR TAXA DE ADMINISTRAÇÃO DO PAÍS - MAIOR CONSÓRCIO DA AMÉRICA LATINA COM MAIS DE 1,5 MILHÕES DE CLIENTES ATIVOS RESULTADOS DAS ASSEMBLÉIAS E IMPRESSÃO DO BOLETO DE PAGAMENTO PELA INTERNET.
A MANEIRA MAIS BARATA E INTELIGENTE PARA PROGRAMAR A COMPRA DO SEU NOVO HONDA.
HONDA
Rio Tókio • Botafogo
Rua General Severiano, 201
21 2122-4999
www.riotokio.com.br
Narita • Barra
Avenida das Américas, 2.001
21 3987-8888
www.hondanarita.com.br
Rio Tókio • Recreio
Avenida das Américas, 14.001
21 2323-9000
www.riotokio.com.br
O valor de R$749,14 refere-se a 75% da carta de crédito para aquisição do New Fit 1.4 Mecânico 101 cv Flex 2009/2009 com valor de crédito de R$38.883,75. Reservamo-nos o direito de corrigir possíveis erros de digitação. Ofertas válidas até a data da publicação. Fotos meramente ilustrativas.